komunikoj

JARO 32-a | APRILO - MAJO - JUNIO | N-ro 130 2008

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.

MEMORINDA EVENTO!



De maldekstre: Cicero Sandroni, Prezidanto de la Akademio, Sylvia Damazio kaj Paulo R. Viola. Beletra Brazila Akademio.

En tre frata etoso, la 13-an de Majo, Eldonejo Lorenz okazigis lanĉon, en la portugala lingvo, de la libro "Dom Pedro II e a Princesa Isabel. Uma Visão Espírita-Cristã do Segundo Reinado", de la ĵurnalisto Paulo Roberto Viola, ĉe Beletra Brazila Akademio, la precipa brazila kulterdomo, kiam pli ol 300 spiritistoj kaj **ne spiritistoj** ĉeestis la memorindan eventon. Ni pliantentigas, ke tiu jarcenta nobla organizaĵo neniam malfermis siajn pordojn por Spiritismo! La momento estis neforgesebla por la spiritistaro!

Alia interesa afero estas ke el la diversaj ricevitaj mesaĝoj gratulante pro la evento, ni reliefigas la mesaĝojn de la Prezidento kaj Vic-Prezidento de Brazilo: S-roj Luiz Inácio Lula da Silva kaj José Alencar Gomes da Silva. Ankaŭ S-ro César Maia, urbestro de Rio-de-Ĵanejro kaj la brazila spiritista mediumo, Divaldo Pereira Franco, sendis gratulajn mesaĝojn al la aŭtoro kaj Eldonejo Lorenz.

Ankaŭ notinda fakto estis ke la Spirita Mondo ĉeestis kaj diktis belajn mesaĝojn. Jen ero de la mesaĝo de l' Spirito Bezerra de Menezes: **"tiu ĉi momento ne estas apenaŭ historia. Ne nur vi enkarniĝintaj, sed ankaŭ ni, elkarniĝintaj, vivas granda festo! La Spiritista Movado estas en festo en la Spirita Mondo!..."**

http://www.editoralorenz.com/fotos.html

**"Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru
via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi."**

KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF



Estimata sinjoro!

Mi sendis al vi 5 ekzempl. de la angla eldono kaj unu de la nova libro. Pro kelkaj kaŭzoj la angla eldono ne povis esti preta ĝis hodiaŭ.

Pardonu, ke mi vin tiel longe atendigis, sed ĝi estis ne mia kulpo.

Kun estimo Esperanto.

_____

Al Einstein, 1888 *

Via demando tuŝante mian personon min mirigas; ĉar en tia afero la persono de l' iniciatoro estas tute sen signifo, kaj mi volus resti eterne sub pseŭdonimo; sed antaŭ vi mi ne volas esti kaŝita: mi estas kuracisto kaj mi ricevis mian edukon en la universitato de Varsovio. Mia aĝo estas 30 (tridek) jaroj, kaj, se Dio volas, mi energie laboros por mia amata afero ĝis mia morto.

Mi permesas al mi, esprimi la esperon, ke parton de via energio vi nun volos donaci ankaŭ al la "Lingvo internacia".

Ricevu la plej respektan saluton de via humila servanto.
Esperanto

* Dato ne konata

_____

>>> ESPERANTO EN LA PRAKTIKO <<<

Ĉe la fino de la pasinta jaro, mi decidis vojaĝi al Peruo por profiti miajn laborferiojn. Ĉar mi devus vojaĝi sole dum la plej parto de la tempo, tial mi decidis kontakti esperantistojn de tiu lando, pere de la retpaĝo Amikumu (www.amikumu.net). Ili tuj respondis miajn mesaĝojn kaj sin afable proponis akcepti min en la flughaveno. La peruanoj estas tre ĝentilaj kaj bonkoraj. Ili multe ŝatas brazilanojn. En Limo kaj Kusko mi estis ĉiĉeronita de esperantistoj, kiuj montris al mi tre interesajn lokojn de tiuj historiaj urboj. En Limo ili invitis min tagmanĝi "ceviche" (Populara perua manĝaĵo konsistanta el fiŝo, polpo, ostroj kaj salikoko) kaj donacis al mi tre bongustan ĉokoladan torton. Estas tre grave, ke ni helpu la disvastigon de Esperanto inter niaj karaj sudamerikaj gefratoj. Unu el la plej bonaj manieroj por fari tion, estas sendube vizitante ilian fascinan landon pere de Esperanto.

Alvaro Motta

Alvaro, kun blanka ĉemizo, inter peruaj samideanoj.

"Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian ĵuĝon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia ĵuĝo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza."

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

(Ĉeĥe: Frantisek Vladimir Lorenc)
Naskiĝis: Zbislav – Bohemio Ĉeĥio), je la 24ª/12/1872
Mortis: Porto alegre-RS-Brazilo, je la 24ª/05/1957
Li vivis dum 84 jaroj kaj 5 monatoj.

Li estis homo kun esceptaj kvalitoj, klera, modesta, humila, afabla, simpla kaj tre bonkora; kompetenta lingvisto, poligloto (li konis pli ol 100 ligvojn), filozofo, verkisto, poeto, instruisto, vortaristo, agrikulturisto, mediumo, spiritisto, esoteristo kaj tre klera esperantisto.

Li lernis E-n tre frue. Em 1890 (18 jara), nur 3 jaroj post la apero de Esperanto (en 1887), li verkis sian unuan libron pri Esperanto: "Plena Lernolibro de la Lingvo Internacia de D-ro Esperanto", por bohemoj, (en la ĉeĥa lingvo). Pro politikaj kialoj li elmigris, en 1893 (21 jara) al Brazilo. Li loĝis dum multaj jaroj en la kolonio Sankta Feliciano (post D. Felicano) distrikto de Encruzilhada do Sul-RS, kie li estis unua grada instruisto kaj terkulturisto (Li posedis malgrandan parcelon da grundo). Li estis la unua esperanstisto en nia lando kaj unu el la unuaj en la mondo. Li akiris brazilan civitanecon kaj vivadis en Brazilo kiel bona civitano dum ĉirkaŭ 64 jaroj kaj emeritiĝis kiel elementa instruisto. Laŭ peto de Ismael Gomes Braga li reverkis la utilan E-metodon "Esperanto sem Mestre", eldonita de Brazila Spiritisma Federacio, tre ŝatata de la nova generacio de brazilaj esperantistoj. Lorenz bone posedis ĉiujn slavajn lingvojn, ankaŭ la latinan, la hebrean, la grekan, la ĉinan, la anglan, la francan, la italan, la araban kaj multajn aliajn. En 1929 (57 jara) li lanĉis portugale sian verkon "Iniciação Linguístca" (Lingvistika Iniciado). Li brile tradukis el la sanskrita al Esperanto, la mondfaman verkon "Bhagavad Gita". En Esperanto li publikigis la verkon "Diverskolora Bukedeto", kolekto de poemoj esperantigitaj el 40 lingvoj, kaj "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo", kun poeziaĵoj mediume ricevitaj per Lorenz mem. Li multe verkis pri kabala, esoterismo, kiromancio, jogo, esoteraj doktrinoj de filozofioj kaj religioj, kaj ankaŭ praktikis homeopation kaj hejmajn medikamentojn.

Je la fino de januaro, 1950, li transloĝiĝis al Porto Alegre (Rua Feliciano de Azevedo, 420 – malantaŭa malgranda ligna dometo) kie li forpasis je la 24ª/12/1957, malriĉa, malsana kaj preskaŭ forgesita! Laŭ Zeus Wantuil, en sia verko "Grandes Espíritas do Brasil" (Brazila Spiritisma Federacio – 1969): "Sen rimedo por kleriĝi kaj sen mono por aĉeti librojn, la tre granda kulturo de F. V. Lorenz ne povas esti komprenata sen la klarigoj de la doktrino de sinsekvaj reenkarniĝoj kaj de la supera mediumeco.

Alberto Flores

LERNU EL LA NATURO

La suno brilas en la alto, por helpi ĉiujn.
La steloj orde grupiĝas.
Rivero atingas siajn celojn, ĉar ĝi lernis ĉirkamiri obstaklojn.
Vazo servas al argilaĵisto, post kiam elportis la temperaturon de la fajro.
Kanalo plenumas siajn celojn, ĉar ĝi ne forlasas sian fonton.
Semado ĉiam produktas lam la deziroj de semanto.
Vegetaĵo forlasas malluman kavaĵon, serĉante lumon por produkti, kvankam ĝi restas ligita al la grundo.

Libro: "Kristana Agendo" / Spirito: André Luiz / Mediumo: Francisco Cândido Xavier

"Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron."

NI SEMAS KAJ SEMAS...

Alproksimiĝas la plej grava dato por la esperantistaro: la Internacia Kongreso de Esperanto, okazonta en Nederlando, kaj, kiel ĉiam, Eldonejo Lornez ĉeestos. D-ro Johano Silva, Direktoro de Lorenz, la 25-an de julio, prelegos pri la temo “Amo al la Proksimulo”. D-ro Johano jam sciigis nin, ke li preparis belan filmon por montri al la ĉeestontoj. Eldonejo Lorenz oficiale invitis la Prezidanton de UEA, S-ro Probal Dasgupta, la eks-Prezidanton Renato Corsetti kaj aliajn eksterlandajn samideanojn por ĉeesti.

Ankaŭ nia Eldonejo jam konfirmis ĉeeston en la nederlanda budfoiro.

En la Ceaara Kongreso, Eldonejo Lorenz partoprenos du foje: en la 13-an de julio, je la 13:30h, en la kongresejo, ni okazigos la Renkontiĝon “Amikoj de Lorenz”. La prelegonto, Paulo Sérgio Viana, pritraktos la samon temon de la Internacia Kongreso: “Amo al la Proksimulo”.

Ankoraŭ en la kadro de la Cearaa kongreso, en la 14/07/08, 17h., la Vic-Prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio en Cearao, S-ro Luciano Klein Filho, prelegos pri la temo Evangelio, Spiritismo, Esperanto. La adreso de la renkontiĝo estas: Strato Sen. Catunda, 117, Benfica.

Ni pliantentigas, ke la lanĉo de Almanko Lorenz 2008 efektiviĝos en la du kongresoj.

En la proksima numero de “Komunikoj”, atendu informojn pri la partopreno de nia eldonejo ĉe la nacia kaj internacia kongresoj de esperanto.

LANÇAMENTO



Preço de capa R$30,00

DOM PEDRO II E A PRINCESA ISABEL

Uma Visão Espírita-Cristã do Segundo Reinado

PAULO ROBERTO VIOLA

No dia 13 de maio de 2008 mais de 300 espíritas e não espíritas prestigiaram e se confraternizaram por ocasião do evento histórico de lançamento, pela Editora Lorenz, do livro “Dom Pedro II e a Princesa Isabel – Uma Visão Espírita-Cristã do Segundo Reinado”, de autoria do jornalista espírita Paulo Roberto Viola, na Academia Brasileira de Letras. O fato relevante é que pela primeira vez na história da centenária organização acontece tal fato: o lançamento de um livro espírita!

O Movimento Espírita não decepcionou, não só em número de pessoas, num ambiente de plena harmonia e intensa confraternização, como também a nossa imprensa marcou presença: Rádio Rio de Janeiro (ao vivo), TV Mundo Maior, Clube de Arte, SEI (Serviço Espírita de Informações), Revista Além da Vida e Reformador. Também prestigiou o lançamento o Jornal Extra.

Outro fato digno de nota foi a presença do Presidente da Academia Brasileira de Letras, o Dr. Cícero Sandroni, concedendo, gentilmente, várias entrevistas, como também a presença do acadêmico Eduardo Portela.

A Espiritualidade também se fez presente, deixando belas mensagens psicográficas e a psicofônica de Bezerra de Menezes, pela mediunidade de Ivan Perdigão, que transcrevemos pequeno trecho a seguir:

“Este momento não é apenas histórico. É um momento em que congregamos na mesma data os nossos companheiros de Umbanda, celebrando o dia dos pretos-velhos, mas, também, o dia em que os nossos irmãos católicos oram para Nossa Senhora de Fátima e ainda nós Espíritas, que aqui comemoramos, não só vocês encarnados, mas também nós, do lado de cá, que vivemos uma festa muito grande. Grilhões partidos, preconceitos derrubados, cancelas arrombadas... Para se chegar aqui, quanto preconceito! Grande data para ser comemorada!”

Kian konsekvencon ni tiru el la intuicia sento, kiun ĉiujn homoj portas, pri la ekzisto de Dio?

“Ke Dio ja ekzistas; ĉar, alie, kia estus la origino de tia sento, se ĉi tiu estus tute senbaza? Ĝi estas ankoraŭ konsekvenco dela principo, ke ne ekzistas efiko sen ia kaŭzo.”

Ĉu la intima sento, kiun ni havas pri la ekzisto de Dio, ne estus rezultato de edukado kaj produkto de akiritaj ideoj?

“Se estus tiel, kial viaj sovaĝuloj havus tian senton?”

Se la sento pri la ekzisto de ia superega estulo estus nura frukto de instruado, ĝi ne estus universala kaj ekzistus, kiel la sciencaj konoj, nur ĉe la homoj, ricevintaj tiun instruadon.

Allan Kardec – La Libro de la Spiritoj

LORENZ

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903 — Caixa Postal 3133

CEP 20001-970 — Rio de Janeiro (Brasil) Tel. (21) **2221-2269**

Home Page: **www.editoralorenz.com** – E-mail: **<editora_lorenz@uol.com.br>**

“Gardu vin, ke vi ne faru vian justaĵon antaŭ homoj, por esti alrigardataj de ili; alie vi ne havas rekompecon ĉe via Patro, kiu estas en la ĉielo.”